

Andrzej kaj Remigiusz Pettyn

# Humuro

LAŬ LA SKOTA MANIERO



*HUMURO LAŬ LA SKOTA  
MANIERO*

***Andrzej kaj Remigiusz Pettyn***

*kun enkonduko de William Auld (Skotlando)*

*desegnaĵoj de Hector Palacios*

## *Eldono de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno*

Tiu ĉi e-libro estas nekompleta testlibro kaj rajtas esti kopiata kaj transdonata libere.

# **ENKONDUKE**

La diversaj krizoj, kiujn ni lastatempe spertas, verŝajne koncernas ankaŭ la sferon de ŝercoj. En la Esperanto-movado ne mankas poeziaĵoj (cetere, neniam mankis!), ni ricevas pli kaj pli da originale verkitaj rakontoj kaj noveloj, eĉ kelkfoje aperas romanoj kaj fakaj libroj. Sed pri ŝercoj kaj anekdotoj oni kvazaŭ forgesas. Oni povus ricevi la impreson, ke esperantistoj ne emas rideti, ne ŝatas ŝerci aŭ petoli. Sed ni ne samopinias pri tio, ĉar ja dum diversaj Esperanto-aranĝoj oni volonte rakontas ŝercojn kaj anekdotojn, ĝenerale oni ŝatas amuziĝi. Kaj fakte oni bezonas ŝercojn kaj anekdotojn, ankaŭ en la formo de legolibroj, por iomete ĝojigi sin mem aŭ amuzi siajn gekonatojn, geamikojn.

Mallongaj ŝercoj kaj anekdotoj povas cetere ne nur amuzi legantojn, sed ankaŭ kontribui al la profundigo de la lingvokono de komencantoj, ĉar ja ĉiu teksto enhavas iom da novaj vortoj kaj iom da gramatikaĵoj, kiujn indas alproprigi. La tralego de eĉ mallonga teksto vastigas la vortprovizon, firmigas en la kapo diversajn gramatikajn regulojn, do resume - tio povas esti tre rekomendinda lingvoekzerco kaj samtempe ponto al la legado de tute ordinaraĵoj literaturaj.

La komencantoj, tuj post la fino de elementa kurso, ne ĉiam ŝatas legi rakontojn, novelojn aŭ ampleksajn romanojn, verkitajn per matura lingvaĵo. Aliflanke ili volonte legas tekstojn mallongajn, facilajn, kies legado donas plezuron pro la tuja kompreno, samtempe liveras iom da ĝojo pro la amuza enhavo. Ĉar ĝuste tiajn mallongajn tekstojn oni bezonas, do ni esperas, ke la ŝercokolekto "Humuro laŭ la skota maniero" ne nur disponigos agrablajn legaĵojn, sed ankaŭ spicos la Esperanto-lernadon per iom da rideto, kiun oni ja bezonas en la nunaj malfacilaj, streĉoplenaj tempoj.

Kun la espero, ke ĉi tio realiĝos - agrablan legadon deziras al vi -

Andrzej & Remigiusz Pettyn

(benataj de skoto - William Auld)

# ***lom da vero pri la „skotaj ŝercoj”***

*Intervjuo kun la skota poeto William Auld*



*Kiel skoto vi certe scias, ke en la mondo cirkulas t.n. „skotaj ŝercoj” Kion vi pensas pri ili? Ĉu tiaj ŝercoj kolerigas skotojn aŭ ili toleras tiajn ŝercojn? Aŭ eble eĉ mem rakontas ilin por amuzi siajn alilandajn geamikojn?*

Jes, ni, skotoj, aŭdis pri tiu fenomeno. Ni ne koleriĝas, ni tutsimple miras, ke alilandanoj tiel funde miskomprenas nin. Jen okazaĵo, kiu klare pruvas la veran skotan sintenon al la mono:

Du skotaj terkulturistoj vizitis Aŭtomobilan Ekspozicion. Aĉetinte forportebajn porciojn da fiŝo kun frititaj terpomoj, manĝante, aliris standon, kie estis eksponataj luksaj aŭtomobiloj de la marko Rolls-Royce. Ili ekvidis tre allogan aŭtomobilon kaj komencis traesplori ĝin (kiom da sakoj da terpomoj ĝi kapablas transporti, k.s.). Alkuris komizo.

Komizo: Ĉu vi serioze interesiĝas pri tiu ĉi modelo?

Terkulturistoj: Kiom ĝi kostas?

Komizo: 50 000 pundojn.

La terkulturistoj rigardas unu la alian, poste diras: Ni aĉetas du!

Komizo: Du?

Terkulturistoj: Kompreneble! Po unu!

Komizo: Dankegon, sinjoroj!

Unu el la terkulturistoj elprenas sian monujon. La alia tuj protestas: Ne, ne, homo! Estas mia vico! Vi ja pagis la manĝaĵon!

*Ĉu skotoj sentas sin lacaj pro la rakontado de ĉi-specaj ŝercoj?*

Ne, ni simple ne plu ridas, ĉar ni jam delonge aŭdis ĉiujn eblajn variantojn. Ĉu eble vi, Andreo, tamen sukcesis trovi novajn?

*Mi ne scias, sed mi kolektis multajn kaj mi esperas, ke kelkaj el ili eble ne estas vaste konataj. Ĉi tion juĝu vi mem kaj la aliaj skotoj. Sed, kara Vilĉjo, mi ege scivolas kaj certe same la legantoj de ĉi tiu libro, de kie venas la „skotaj ŝercoj”? Kie ili naskiĝas? Diru al mi, Vilĉjo, sincere, ĉu la ŝercojn elpensas la skotoj mem kaj cirkuligas ilin tra la mondo aŭ eble la „skotaj ŝercoj” apartenas al la t.n. popola humuro, kiu iom post iom transformiĝas?*

Ni, skotoj, opinias tion komploto de tiuj damnindaj angloj, kiuj ĵaluzas pri ni kaj nia nacia malavaro, kaj volas nin senvalorigi per la elpensado de kompletaj malveraĵoj. Ekzemple, anglo Sydney Smith (1771-1845) aplombe asertis: „Por enirigi ŝercon trafe en la komprenon de skotoj, necesas ĥirurgia operacio". Tiu aserto estas komplete senfundamenta. Necesas nur kelkaj klarigoj.

*Ĉu skotoj priridas aŭ primokas per similaj ŝercoj alilandanojn? Se jes, kiujn kaj kiamaniere?*

Nu, jes, la anglojn - kompreneble! - (la venĝo estas dolĉa!). Tio havas ankaŭ politikan dimension. Ni citu ekzemplon:

Motoro de aviadilo paneis kaj la aviadilo komencas malaltiĝi. Fine la piloto konstatas: „Necesas malpezigi la maŝinon; iu devas sin oferi!” Stariĝis kimro kaj ekkriis „Mi ofertas min pro Kimrujo!”, kaj li elsaltis. Tamen tio ne sufiĉis. Stariĝis irlandano kaj ekkriis „Mi ofertas min pro Irlando!”, kaj li elsaltis. Kaj tamen tio ne sufiĉis. Stariĝis tiam skoto, li ekkriis „Mi ofertas min pro Skotlando!”, kaj li ... elĵetis la ... anglon.

*Mi lasas ĉi tion sen komento. Sed - mi ne scias pro kio - ĉi-momente mi pli kaj pli pensas pri tio, ke eble en Skotlando, eble en la skota literaturo (?) ekzistas homo, kiun oni povus nomi „la patro de la skota humursento”? Ĉu - laŭ vi - se mi ĝuste konkludas, li/ŝi povis influi la disvastiĝon de skotaj ŝercoj en la formo, kiun ni ĉiuj konas?*

Serioze, jes! Li nomiĝis Harry Lauder, kaj fine de la 19a kaj komence de la 20a jarcentoj li estis landkonata (eventuale eĉ mondkonata) kantisto kaj komediisto. Li vestis sin per karikaturo de la nacia kostumo kaj iĝis tiel populara (ĉefe pro siaj sentimentalaj kantoj, kiujn ĝis hodiaŭ konas ĉiu skoto parkere), ke multaj homoj en- kaj eksterlande akceptis lin kiel la stereotipan skoton. Se li ne inventis, li certe popularigis ŝercojn pri la avareco de ... la homoj en la urbo Aberdeen. Tiaj estas la ŝercoj, kiajn hodiaŭ vi, alilandanoj, atribuas al ĉiuj skotoj (per speco de ĝeneraligo). La influo de Harry Lauder estis ja grandega. Interese estas, ke li mem ricevis la reputacion de avarulo, sed fakte li private kaj senreklame donacis grandajn sumojn al bonfaraj organizaĵoj.

*Kiaspecaj estas la ŝercoj, kiujn oni rakontas en Skotlando? Pri kio temas?*

Tipa skota ŝerco emas esti iomete satira. Oni tre ŝatas renversi la evidentaĵojn. Tion enkapsuligas la jena rakonto:

La putino Janjo loĝis tutsupre en modesta apartamento en la sesa etaĝo, kie ne troviĝis lifto. Iun vesperon ŝi staras antaŭ la stratpordo serĉante klientojn. Preterpasas kolegino, kiu salutas: „Kia sukceso?” Janjo

fanfaronas: „Hodiaŭ mi ja dudekfoje grimpis la ŝtuparon”. „Ho, mia kara” diras la kolegino, „viaj kompatindaj piedoj!”

Kiel en multaj landoj la nacia religio ofte elvokas ŝercojn. Skotlando ĝis antaŭ nelonge „ĝuis” specon de tre puritana kalvinismo, kiu, kiel multaj totalismoj, vekis samtempe timon kaj malŝategon. Pro tio la suba tradicia spritaĵo vekas aprobon de ĉiu skoto, kaj iĝis tradicia citaĵo, kiam io estas neevitebla:

Kaj ili mortis kaj trovis sin antaŭ la trono de la Eternulo. Kaj la bona Dio verdiktis: „Dum via tera vivo vi mensogis, hipokritis, adultis, drinkis, ludis kartojn. Pro tio vi pasigos la eternecon suferante turmentojn en la infero.” Kaj la mizeruloj vekriis: „Bona Dio, ni ja ne sciis! Ni ja ne sciis!”

Kaj la Eternulo el sia senfina kompatemo respondis: „Nu, jam vi scias!”



Vortludoj tre plaĉas al skotoj. Tre ofte okazas, ke virinoj interesiĝas, ĉu oni portas kalsonon sub la kilto, kaj demandas, „Kio estas *worn* (vestita) sub via kilto?” Oni indigne respondas, „Sinjorino, sub mia kilto nenio estas *worn* (eluzita)”.

*Diru al mi, kara Vilĉjo, ĉu en Skotlando la vivo mem, ekz. la soci-politika vivo, influas la naskiĝadon de ŝercoj?*



Jes. Ekzemple, en Skotlando ekzistas du vortoj, kiuj tradukiĝas per skota. Ili estas *Scotch* kaj *Scots*. Satirulo (kun serioza celo) atentigis, ke la formo *Scotch* aplikiĝas nur al aferoj aĉeteblaj, kiel viskio, tomatoj, ovoj kaj politikistoj.

*Ĉu el la cirkulantaj ŝercoj oni povas konkludi, kia estas la tipa (meza) skoto en la ĉiutaga vivo?*

Se juĝi laŭ la ŝercoj, tipa skoto estas malalta, agresema, amikeca (jes, samtempe), sprita, drinkema kaj sentimentala. Ekzistas kelkaj tiaj skotoj, tamen la plimulto el miaj konatoj ne konformiĝas al tiu bildo, aŭ konformiĝas nur sporade. La vere admirindaj skotoj estas skotinoj. Ial mi pensas pri tiu anglo, kiu vizitis Glasgovon je la unua fojo, komerce, kaj vane serĉadis la celatan firmaon, kies adreson li havis, sed la lokon ne trovis. Do, li haltigis surstrate iun mezaĝulinon (ĉiuj skotinoj estas mezaĝulinoj) kaj demandis, kiel atingi la adreson. Ŝi povis doni al li iom komplikajn direktigojn, kaj per iom da klopodo li ja trovis sian celon. Ses monatojn poste li devis denove viziti Glasgovon kaj la saman firmaon, sed intertempe li forgesis la direktigojn kaj ne trovis la lokon. Do, li haltigis mezaĝulinon kaj pridemandis ŝin. „Ho, filĉjo!” - ŝi ekkriis, „ĉu vi ankoraŭ ne trovis ĝin?!”

*Oni diras, ke la rido plilongigas la vivon, ĉu do la meza skoto vivas pli longe ol ekz. anglo aŭ franco aŭ germano? Kion pri tio diras la statistikoj?*

Statistike angloj vivas du jarojn pli longe ol skotoj. Ni klarigas tion per la fakto, ke la bona Dio tiel amas la skotojn, ke Li volas havigi al ili du pliajn jarojn en la paradizo.

*Oni diras, ke homoj bezonas ŝercojn en ĉiu aĝo. Kion vi persone opinias pri tio kaj pri „skotaj ŝercoj” speciale?*

Mi trovas neniun aĝdiferencon, kiam temas pri ŝercoj, kaj certe junuloj ne mokas maljunulojn, nek inverse. Mi kaj mia filo reciproke ŝatas la ŝercojn unu de la alia, kaj ofte konkurencas por aldoni la finan tornon al iu koncepto.

*La meza eksterlandano plej ofte asocias la vortojn „skoto” kaj „Skotlando” kun ekzemple skota viskio, skotaj ŝercoj, kilto, skotaj futbalteamoj, malpli multe oni scias pri la skota patriotismo kaj ĝenerale pri la historio de*

*Skotlando. Kion - tre koncize - vi povus diri al la „meza” leganto de ĉi tiu libro pri tio, kion li/ŝi devus scii pri skotoj kaj Skotlando?*

La meza skoto scias pri alilandanoj sufiĉe multe, sed se temas pri Skotlando alilandanoj devus scii unuavice, ke:

a. Skotoj ne estas angloj, kaj Skotlando ne estas Anglujo. La komuna ŝtato nomiĝas Britujo - aŭ, se vi volas, la Unuiĝinta Reĝlando.

b. Ekzistas minimume tri distingendaj specoj de skotoj, diferencas dialekte, karaktere kaj historie: montaranoj-insulanoj, orientanoj kaj okcidentanoj. Parolataj estas tri lingvoj: la gaela, la skota kaj la angla, sed ili ne limiĝas al la supraj geografiaj regionoj.

c. La skota poeto Robert Burns estas mondkonata, kaj laŭdire en diversaj lingvoj troviĝas tradukoj de liaj poeziaĵoj, i.a. en la pola lingvo.

ĉ. Kildo, aŭ vira jupo, estas tradicia vestaĵo en Skotlando. La moderna estas pli formala ol antaŭ ducent jaroj. En 1745 la anglaj konkerintoj malpermesis porti ĝin, sed la reĝo Georgo IV portis ĝin dum vizito en Edinburgo, do ĝi denove fariĝis moda. Estas interesa fakto, ke al skotaj soldatoj estas rigore malpermesate porti kalsonon sub la kildo (ĉar porti kalsonon estas inece!). Mia patro diris, ke en la tranĉeoj dum la Unua Mondmilito ili kunpinglis la vostojn de la ĉemizo por almenaŭ iomete ŝirmi la korpon. Viroj, kiuj ne estas soldatoj ... Nu, sed ĉi tion mi ne rivelos al vi!

d. Skotlando estas politike maldekstra. En la nuna brita parlamento [La intervjuo estis farita en 1990] la reganta konservativa partio havas nur ok parlamentanojn el sepdek en Skotlando.

e. Oni kulpigas la pioniran skotan ekonomiiston Adam Smith (1723-1790) pri la bedaŭrinda stato de la kapitalismo en Britujo; sed li estas tiel ofte misinterpretata kiel Karl Marx.

f. En 1603 la skota reĝo iĝis reĝo ankaŭ de Anglujo, kaj en 1707 la parlamentoj de Skotlando kaj Anglujo unuiĝis. Tiun lastan ankaŭ hodiaŭ la plimultaj skotoj rigardas kiel akton perfidan.

g. Plej grave - skotoj ne estas angloj!!!

Interparolis Andrzej Pettyn

# *Humuro laŭ la skota maniero*

1



Kiom da viskio povas fortrinki skoto? Tiom - per kiom da viskio oni regalos lin!

La libro, kiun vi nun vidas, estas nur testlibro, kaj enhavas nur parton de la kompleto.

257

Ĉe kuracisto:

- Vi devus rezigni pri la fumado de cigaredoj kaj ĉiuvespera trinkado de viskio, kaj samtempe vi devus ĉiuvespere enlitiĝi por tuj ekdormi jam je la 21a horo. Ok pundojn mi petas!

- Dankon, doktoro! - Sed imagu, ke mi tute ne intencas sekvi vian konsilon kaj des malpli pagi por ĝi ...!

# **METODIKA POSTPAROLO**

La libro *Humuro laŭ la skota maniero* liveras al la legantoj mallongajn, relative facilajn tekstojn, povas fariĝi tute bela ponto kondukanta al la memstara legado de maturaj literaturaĵoj en la lingvo Esperanto. La tekstojn oni povas utiligi por legado kadre de la memlernado, sed ankaŭ por komuna legado en studrondoj, ligita kun kromaj ekzercoj, kiujn devus elpensi la instruanto mem depende de la bezonoj kaj propra kapablo. Ni ne volas trudi tiujn aŭ tiujn metodikajn paŝojn, sed kelkajn el ni simple dezirus nur rekomendi laŭ niaj multjaraj spertoj.

Plej grava afero estas, ke post la unua komuna tralego de tiu aŭ tiu teksto en studrondo, la gvidanto de la ekzercoj klopodu plifirmigi en la memoro de la studrondanoj la enhavon de la koncerna ŝerco. Kompreneble, oni ĉefe ne celas la enhavon, sed la lingvaĵon, kin enestas en la koncerna ŝerco. Ĉiun tekston oni devus tralegi kelkfoje, eble ne tuj, eble post kelkaj tagoj, sed ĉiam oni ligu tion kun nova, freŝe elpensita ekzerco.

Al la plej tipaj apartenas la ekzercoj evoluigantaj la **kapablon kompreni**. Ili ĉefe konsistas en demandoj ligitaj kun la koncerna teksto: *kiu, kion, kie, kiam, kiamaniere* ktp. En la komenco la demandojn faru la kursgvidanto mem, pli poste la demandojn faru la gelernantoj. Ni ĉiam memoru, ke la gelernantoj lernu ne nur **respondi**, sed ankaŭ **demandi**! Povas esti, ke iuj el fariĝos en estonteco Esperanto-instruistoj, do - kial ne? - ili ankaŭ lernu, kiamaniere instrui, kaj sen la kapablo demandi la instruado ne estas plenvalora!

Apud la ekzercoj konsistantaj en tipaj demandoj diversformaj ligitaj kun la koncerna teksto - tre utilaj estas frazoj-enigmoj kun multfoja elekto inter la proponataj frazostukturoj. Ekzemple la ŝerco n-ro 257: Kiu el la frazoj konformas al la vero: - La kuracisto konsilis, ke li devus a) rezigni pri la fumado?, b) rezigni pri la flirtado kun virinoj?, c) rezigni pri la nokta studado de la Esperanto-gramatiko kun ĉarmaj virinoj?

Tiu aŭ tiu frazo povas esti malproksima de la vero, sed ĉiam la frazoj devas esti ĝustaj laŭ la lingva vidpunkto, iafoje povas esti amuzaj, kion ni

speciale rekomendas al la kursgvidantoj. Kompreneble, devas konformi al la vero enestanta en la teksto!

Unu el la tre bonaj ekzercoj estas formulado de ekzemple du respondoj, kompreneble ambaŭ estas ĝustaj lingve, sed iel rilatas la pritraktatan tekston. La gelernantoj mem per diskutado decidas, kiuj respondoj konformas al la vero (enestanta en la teksto). Eventuale povus klarigi, kial tiu aŭ tiu frazo estas plene konforma al la vero aŭ estas falsa.

Sed niaj ekzercoj ne nur koncernu la kapablon kompreni - ankaŭ traktu laŭvican ŝercon kiel pretekston aŭ elirpunkton por tre diversaj ekzercoj evoluigantaj la lingvouzon, temas ekzemple pri la kompreno de iu vorto laŭ la kunteksto (konjekto de signifo), eltrovo de la ĉefa tekstoideo, ktp. aŭ eltrovo de iu gramatikaĵo pri kiu deziras atentigi la kursgvidanto. Ekzemple trovu en la teksto vorto(j)n kun la sufikso ... *-ind*, kun la prefikso *eks-*, ktp. La trovita ekzemplo povas servi por serĉado de similaj aplikoj de la koncerna gramatikaĵo aŭ oni povas ĝin uzi alimaniere. Ĉio dependas de la inventemo de la kursgvidanto! Ifoje oni povas proponi alian daŭrigon de la ŝerco, por iomete sproni la fantazion de la gelernantoj, ifoje oni povas proponi kompletigon de la baza teksto per kromaj epitetoj aŭ aliaj vortspecoj, kiujn trudu la instruisto pripensinte la eblecojn de siaj gelernantoj.

Finante mi dezirus substreki, ke ne estas necese legi la ŝercojn laŭ la aperigita sinsekvo. La kursgvidanto laŭplaĉe mem „saltu” de ŝerco al ŝerco, libere elektante la tekstojn.

Agrablan legadon deziras

Andrzej Pettyn

Varsovio, la 31an de januaro 1995.

# ***Kolofono***

Humuro laŭ la skota maniero / Andrzej kaj Remigiusz Pettyn

Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo

Unua broŝurita eldono: 1995.

Dua eldono kiel bitlibro: 2009.

ISBN 90 71205 60 6

UGI: 352

SISO: 829

UDC: 82 7

IBAN: 11-11-340-74

D/1995/2924/5

© ĉe la aŭtoro